

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sokr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
C.c.p. Association Catholique Française pour l'Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 2,50 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. ====

---- N° 117 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JULIO 1978 =====

BILETO DE LA PREZIDANTO.

Pentekosto 1978

Voici, en cette fête de la Pentecôte, que nous assistons à l'explosion, au souffle de l'Esprit, de l'annonce de la Bonne Nouvelle aux peuples de toutes langues. Ce que Jésus avait enseigné à un petit groupe, est soudain proclamé et se répand, à partir de Jérusalem, jusqu'aux limites du monde connu.

Mais, dans toute l'histoire, la vague de fraternité dans la foi se brisera aux oppositions, aux querelles, aux contestations, aux compromissions que le monde temporel secrète. Et pourtant l'immense appel à l'unité de tous les humains a toujours été ressenti, il l'est de plus en plus. Le message évangélique a toujours été le plus propre à promouvoir une harmonie, une entente dans la pluralité des peuples et des nations.

Notre mouvement, au sein du vaste domaine du monde espérantiste, se doit de servir cette marche vers l'union, mais sans perdre de vue que celle-ci se situe dans la perspective du Royaume annoncé par le Christ.

Monseigneur l'Archevêque de Tours, au cours de l'entretien qu'il a bien voulu nous accorder, a mis l'accent sur la vertu caractéristique des espérantistes... l'Espérance dont Zamenhof a adopté le nom et qu'il a chantée dans l'hymne qu'il a composé. Mais, pour nous chrétiens, l'Espérance est une vertu théologale, elle s'applique au règne de Dieu "sur la terre comme au ciel". Ce sera pour nous, en ce temps de Pentecôte, la pensée directrice de l'effort persévérant que nous menons pour que les hommes de tous les pays puissent entendre ensemble la même parole, et que celle-ci soit le reflet du Verbe de Dieu, sous l'impulsion de l'Esprit Saint.

René-Claude COLAS.

BONAN SOMERAN

LIBERTEMPON AL ĈIUJ ...

EN ESPERANTUJO ! ! !

ELTIRAJO EL LA JARA RAPORTO pri la agado de la asocio 1977/1978

- NIA KONGRESO 1977. En la priorejo de La Houssaye, la kongreso okazis. La triono de la komitato estis per baloto reelektita. La komitato decidis reatribui la samajn postenojn al la estraranoj.
- NIA KOMITATO. Ĝi kunvenis regule ĉiun trian monaton, kaj dankas UFE pro la akcepto en ĝia oficejo. Ni ĉiufoje bonvenigas observantojn, kaj invitas niajn anojn ĉeesti.
- NIA BULTENO. "Franca Katolika Esperantisto" estas tre taŭga ligilo inter ni. Ĝi dissendas la protokolojn de la komitatkunvenoj, novaĵojn pri la movado, kaj interesajn tekstojn. Tre vivplena estas la lingva rubriko, kaj la franclingva ĉefartikolo celas esti utila por la informado.
- PROPAGANDO. Mi gratulas niajn amikojn, ĉu katolikajn, ĉu protestantajn, kiuj disdonis en siajn mediojn la flugfoliojn komune eldonitajn de niaj ambaŭ asocioj. Ĉiuj lokaj grupoj, eĉ malgrandaj, devas kontakti personojn, asociojn grupojn, kaj laŭeble proponi kursojn. S-ro Despiney kaj aliaj plurfoje sendis al diversaj gazetoj komunikojn aŭ artikolojn, kiuj plej ofte trafas la intereson de la redakcioj; oni devas fari pli grandskale tion en la lokaj gazetaraj.
- IKUE. EK. Nia asocio estas membro de IKUE, kies sidejo nun estas en Romo. Pluraj anoj de nia asocio partoprenis en ties kongreso en Ĉenstovo (Pollando). La internacia ligilo estas oficiale la revuo "Espero Katolika". Depost la lastaj jaroj, la redaktoroj klopodis por plibonigi la aspekton kaj enhavon, kaj tiel sukcesis doni al tiu monata revuo, preskaŭ sepdekjara, la necesan prestiĝon. Ni deziras al D-ro de Salvo, la nuna redaktoro, plenan sukceson, kaj ni petas ĉiujn niajn amikojn fariĝi abonantoj de EK.
- UEA. UFE. La ĝenerala Esperanto-Movado kaj la fakaj organizaĵoj devas reciproke sin subteni. Nenio estus ebla se ne estus ĝenerala neŭtrala agado, kiu kapablas eldoni presaĵojn kaj librojn, organizi kursojn kaj rondojn, agi apud la oficialaj lokaj instancoj k.t.p. Niaj individuaj aliĝoj estas napre necesaj!
- RELIGIAJ FAKTOJ. Pastro Degrelle kaj S-ro Bernard preparas "Kristana Kantaro"-n uzeblan en ĉiuj cirkonstancoj (Diservoj, mesoj k.t.p.)
 NIA EKUMENISMO. Nia asocio, kiel katolika movado, prizorgas laŭeble la celebradon de la Sankta Meso, laŭ tekstoj aprobitaj de la ekleziaj instancoj, okaze de diversaj neŭtralaj kongresoj. Niaj rilatoj kun la kristanaj rondoj estas tute frataj.
- KONKLUDO. Fine, mi devas, en la nomo de la Asocio, diri kiel grava kaj utila estas la laboro de S-ro Despiney en la ĝenerala Esperanto-movado, de S-ino Vincent, speciale en ŝia rolo de kontrolo de la lingvaj ekzamenoj, de Pastro Bourdon, kiu agadas en la rondoj de Lille, kaj de Pastro Degrelle, kies agado apud infanoj kaj junuloj estas vigla kaj lerta.

XX

NIA MEMBRARO

NOVAJ MEMBROJ 1978/ 10: F-ino LANGLOIS Jacqueline (M & L).
 XXX

ELDONA FONDUSO: S-ino Michau: 20 F. Profito kongreso Tours: 394 F. F-ino Vanneau: 36 F. S-ro Despiney: 40 F. S-ro Thiollière: 50 F. F-ino Le Boëdec: 25 F. Sume: 565 F.

Tre koran dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacintoj...

LUMOSOIFO

En la lumo
kaj la varmo
de tagmezo
verda arbo
al la ĉielo levas la branĉojn.
Ĉar ĝi lumosoifas,
Sinjoro.

En la mallumo
kaj la malvarmo
de la malliberejo
sola, tre sola homo
al la ĉielo levas la okulojn
Ĉar li lumosoifas,
Sinjoro.

En la maltrankvilo
kaj la necerteco
de mia animo
al la ĉielo mi levas la okulojn.
Ĉar mi lumosoifas,
Sinjoro.

Wanda KRZYZAK (tradukis AB)

=====

FINANCA RAPORTO 1977

ENSPEZOJ	!	ELSPPEZOJ	
Kotizoj	2 025,00	! Bulteno	1 859,82
Donacoj	84,00	! Korespondado	399,15
Profito kongreso La Houssaye	266,40	! Vojaĝoj	453,30
Rentumo ŝparkaso	<u>42,36</u>	! Diversaj	<u>270,46</u>
	2 417,76	!	2 982,73
Negativa saldo la 31/12/77		564,97	
En la kaso la 1/1/77		<u>2 433,80</u>	
Pozitiva saldo la 31/12/77		<u><u>1868,83</u></u>	

=====

REZULTOJ DE LA BALOTADO EN TOURS

Ĉu vi aprobas la agadon de FKEA? Jes 55 Ne 0 Sindeteno 0

Renovigo de 1/3 de la komitato:

BESSIERE Albert	55
BOURDON Louis	55
Colas R. Claude	55
DESPINEY Roger	55

Ĉiuj estas reelektitaj kaj la estraro restas senŝanĝa.

=====

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 4-a DE MAJO 1978.

Ĉeestas: P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Bessière kaj Véron.

Post enkonduka preĝo kaj akcepto de la tagordo, la komitato pristudas la jenajn punktojn:

Kongreso en Tours: Ĉiuj agnoskas, ke tiu kongreso estis tre bona kaj dankas al S-ro Lecocq, la organizanto.

Kiel plibonigi la venontajn kongresojn? ekspozicio, prelego, debato? starigo de honorkomitato, invito de ĵurnalistoj, preparo de la diservo (kantoj, tekstoj), temo bone elektita, por ke ĉiuj partoprenu (ekz. komuna meditado de parto de la

Evangelio), detala priskribo de la temo en la bulteno, por ke la kongresantoj preparu sian intervenon...

Kongreso 1979: apud Sens, la 28/29-an de aprilo. Organizantoj: Pastroj Schneider kaj Degrelle.

Kunveno kaj diservo en Clermont-Ferrand: pri la unua, oni provas kunveni kato-likajn kongresanojn. Pri la dua, oni fidis je P-ro Kindler, kiu ĝin preparas. Rilatoj FKEA/IKUE. "Espero Katolika" estas bona revuo. Oni bedaŭras, ke ĝi ne respektas la ĉenstaflovajn decidojn: unu paĝo kun spirita temo, unu paĝo junulara, unu paĝo porknaba. Kvankam redaktita de tre kapabla homo, tamen estus preferinde, ke pluraj homoj ĝin redaktu, por ke ĝi estu vera ligilo. Oni bedaŭras, ke la gvidado de IKUE ne estas sufiĉe demokrata. Preferinde ol laboro farita de kelkaj en kvazaŭa sekreto, indus trovi novan labormanieron, por ke ĉiuj IKUE-komitatanoj vere partoprenu. Eĉ perletere multe da komuna laboro povus esti farita. Estus bone, ke la programo de IKUE-kunveno okaze de la UK aperu en EK. FKEA opinias, ke laik(in)o pli ol sacerdote taŭgus kiel IKUE-prezidanto.

Informilo: oni atendas la liveron de la dua eldono (5000 ekz.)

Verko de Korytkowski: P-ro Bourdon montras kelkajn dekojn da tajpitaj folioj. Li taksas la elspezon je 5000 F por 1000 ekz.

Oni malfermas fonduson cele al la eldono. Ĉiu partoprenu laŭ sia eblo.

IKUE-kongreso en Lourdes.

Bona ideo. Ĉu eblos en 1981? Ĉu ni trovos surlokajn esperantistojn por ĝin prepari? Nia sekretario skribos al S-ro Fabre, kiu loĝas ne tro malproksime de Lourdes.

Protokolis: Roger DESPINEY.

XX

MALFERMITA LETERO DE LA EPISKOPO EN ORLEANS
AL MONSINJORO LEFEBVRE

Antaŭ proksimume dudek jaroj vi akceptis min en Dakar, via diocezo. Kune ni frate dumvivis la du enpeniĝojn, kiujn mi predikiis al viaj sacerdotoj. Dum mia deksepjara episkopeco mi neniam fermis mian pardonon al iu. La orleama episkop-ejo estas via domo.

Ni ambaŭ estas episkopoj de Jesuo Kristo. Neniu el ni estas posedanto de la Eklezio kaj de ĝiaj sakramentoj.

Neniu el ni povas senorgoje aserti, ke li posedas la tutan veron kaj estas la vera gardanto de la Biblio.

Ni ekzistas nur por servi la popolon de Dio fidele al Kristo.

Bonvolu do kompati niajn katolikajn fratojn, kies kredon vi malkvietigas. Kompatu ankaŭ la infanojn, kiujn vi konfirmos sen permeso de la Papo aŭ de la episkopo.

Bonvolu pardoni tiun krion el la koro.

Mi povas esti nur amiko via.

Jesuo Kristo nin gardu en la paco.

Guy Marie RIOBE

episkopo en Orléans

XX

PENSJOJ

La senlimaj paciencoj de Abrahamo
En regulaj marŝkadencoj ĝis amĉiamo
Respegulas por la mondo Dipaciencon
Samakrede respektante improvidencon




La kuraĝa Apostolo kun egkonfido
Surgenuis sur la vojo antaŭ la Diido
Kaj promesis proprabuŝe plenobeemon
Sin oferos sebezona memanatemon.

Ĝis la morto de propra fil'
Jen en ĉiu vera humil'
Jen sindomo ĝis plena sat'
Sed por Dio ... sen surogat'.

Kompreneble en via kor'
Nun ekfajras ama furor'
Kristo restos via konsol'
En via mort'. Lia? ... en sel'.

Roger DEGRELLE.

SOLVOJ



- ALUMETOJ -

Kion vi opinias pri alumetoj ?...

Ĉu ne estus bona ilo por ludi ?...

"Eble ! diras vi, sed iom danĝera"! - Ne ! tute ne ! ĉar, per nur ok el ili, vi povus (sen finaĵo) estingi eventualan incendieton.


jen : 

Do, ni ludu per alumetoj, kiuj permesas multe da diversaj amuzoj.

Per ili oni povas pruvi ke :

- A.1-Duone dekdu estas sep ...
- A.2-Naŭ dividite per du estas kvar...
- A.3-Unu el deknaŭ restas dudak ...
- A.4-Trioble du estas kvar...

Nun, faru per 17 alumetoj ses similajn kvadratojn kiel ĉiapude.



A.5-Formetu 5 al. por lasi nur tru kvadratojn

A.6-Formetu 6 al. por lasi nur tri kvadratojn

A.7-Formetu 1 al., transloku tri. Devas resti kvar kvadratoj.

A.8-Per 12 al. faru 6 similajn triangulojn

A.9-Per 6 al. faru 4 similajn triangulojn

A.10-Ok similaj trianguloj estas konstruitaj el 16 al. Formetu 4 al. por nenigi 4 triangulojn.

GENERALA KUNVENO

Verdfolio flugis tra Francio.
 Por anonci pri espera scio
 Koncernantan nian lingvon karan
 Kunigantan grandpopolon ... knaran
 Ne pro sveno de l' forto herolda
 Sed pro ago pri la ĝoj' kabalda.
 Kaj diskutas draste veteranoj
 Pri kiela ven' de junanoj.
 Nu jen ŝvebas en aero pura
 Gravproblemo pri koloro nura:
 Ĉu ni prenos rozkoloran inkon?
 Ĉu ni uzos verdecan konvinkon?
 Kongresanoj, streĉu vian cerbon,
 Ekpripensu la bonan adverbom!
 Dumsomere verdo tuj flaviĝos
 Sed aŭtune rozo egprestiĝos.
 Se vi volas havi bonan hokon,
 Ne timegu fari plenan stokon
 De la verdkoloraj flugpaperoj
 Belkovritaj per rozaj literoj.
 Sed atentu pri la protestanto
 Ne ŝatanta havi laŭ grandkvanto
 Verd koloron roze buntmiksitan
 Al agado forte malincitan.
 Sed ĉu veras, ke koloro roza
 Verdiĝinte estas pli ripoza
 Ol la roza idiĝonta verde,
 Sed ĉu poste ĝi ne iĝos... ? Merde,
 Vidu! pluraj ŝerĉe mute konkas
 Dum aliaj ŝerĉe brue rankas!
 Sed feliĉe por ni la kongresa
 Prezidanto per pelad' senĉesa
 Kunen igas ĉiujn membrojn same
 Al la vero objektiva ame,
 Helpe de la kasistino rava

Kaj tucerte pri kontĝusto prava.
 "Ĉu pli kostas verdfarite?
 Ĉu ni pagos gravan monon spite
 Helan rozon? Tuj respondu, anoj
 De kristana etkongreso!" - "Banoj
 En freŝakvo sen kolor', do klara,
 Certe restas malmultkostaj, kara!"
 Dume helpkasisto per bluĉekoj
 Provas, ke sekiĝu far paglekoj
 Komitata elspezad'. - "Georgo!
 Klamas kasistin', atentu! zorgo
 Mona urĝas malpli ol la trovo
 De koloro flugfolia". Brovo
 Super ŝvela barbo ekmoviĝas
 Dum abela menso reĝvertiĝas,
 Pripensante pri kolor' flavora
 De mielo al sanig' favora.
 Sed nun ni aŭdas sekretarion
 Ekkantantan novsekretarion
 Pri verd-rozo roze verda. Hela
 Estas lia nuna vort' akcela!
 Sed ĉu povas resti sen riproĉo
 Tiu voĉo sen kolordiboĉo?
 Male forte stara Ludoviko,
 Nin alvortas sen tro da mimiko
 Per parolo kun help' de la manoj
 Laŭ kutimo de l' Dominikanoj
 Pri malbono de la rozkoloro
 Kaj feliĉo el verda rigoro.
 Li parolas. Sed jen tuj silento
 Pro stomakon alloga torento
 Da manĝaĵoj multaj kaj variaj
 Por la homoj malsamopiniaj.
 De nun flugas tra Franci' denove
 Blankfolio junajn anojn kove!

DEGRELLE Roger

Tours 16/4/78 - Nancy 18/4/78

+++++

KOMITATKUNVENO

Ĝi okazos la 8-an de Oktobro je la 14.30 ĉe la sidejo de UFE en Paris.

Kiel kutime, ĉiuj observantoj estas bonvenaj. Ne timu ĉeesti!

+++++

LINGVA ANGULO

Al la lastaj proponoj respondis: S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G), Le MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU.

- 1) un caractère à l' emporte-pièce: kruda, maiglata karaktero (B); agresemo, perfortema agmaniero (D); ordinara karaktero (D); tranĉa, sennuahca, morda karaktero (L); impulse drasta karaktero (M).
- 2) dire entre quatre yeux: diri okulojn kontraŭ okuloj, okul' al okule (B); kontraŭvizaĝe (B, M); diri rekte, sen atestantoj, aparte sciigi (D); vid' al vide ion: diri (G); intime, aparte, duope, izolite diri (L); interparoli vid' alvide (M).
- 3) entrer en coup de vent: fulmorapide eniri (B); kvazaŭ ventoblove eniri (D); rapidege eniri (G); impetega, kvazaŭŝtorme eniri (L); uragane eniri momenteton, ĵus enirinte tuj eliri (M).

- 4) envoyer à tous les diables: forregali, forspiti (B); kolere forĵeti (D); kole-re ignori (G); senindulge, kolerege forregali (L); forsendi diablarloken (M).
- 5) envoyer dans les décors: perforte vakiqi la lokon, elĵeti el la boksejo (B); abrupte rifuzi, forpeli (D); sendi for el la vojo (G); (akcidente) puŝbati trans la vojflankon (L); abrupte delokigi, forsendi eksterscenen (M).
- 6) épater la galerie: mirkonsterni la ĉirkaŭantaron, mirigi la ceterajn (B); mir-silentigi la aŭdantojn (D); mirigi la ĉeestantojn (G, L); imponegi ĉeestantojn (M)
- 7) une épée à deux tranchants: ambaŭflanka glavo (B); duklinga glavo (D); duaspek-ta afero (G); ambaŭtranĉa kritiko, argumento (L); kontraŭtrafa armilo, inversebla defendilo (M).
- 8) renvoyer la balle: vigle rebati, akre respondi (B); doni embarasigan respondon (D); turnigi kritikon al ĝia farinto (G); tuj rebati (L); resendi ricevitaĵon, reciproki ruzetaĵon (M).
- 9) cela lui fait une belle jambe: el tio li ĉerpas nenian profiton, jen li neniel avantaĝata (B); tio ne donas al li avantaĝon (D); tio tute ne helpas al li (G); tio ne utilas al li (L); neniel utile por li, senhelpa rimedo por li (M).
- 10) faire des gorges chaudes: senbride mokegi iun, maksatiĝi pri iu (B); brue mokadi (D); senpravé ĝojegi (G); bruege, laŭte, publike moki (L); maldiskrete, sentakte primoki (M).

Post tiuj proponoj venas la tria klasifiko por 1978:

- 1) S-ro LE MARQUAND (20); 2) S-ino MICHAU (19); 3) S-ro BOURGOIS (12);
4) en egaleco: S-roj DAUCHEZ kaj GUILLON (8); 6) en egaleco: S-roj DEGRELLE, DE SALVO kaj FARDET (5).

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois: 1) se faire épingler; 2) épon-ger ses dettes; 3) épouser une cause; 4) avoir l' air absent; 5) essayer un af-front; 6) essayer un refus; 7) essayer un revers; 8) avoir de l' estomac; 9) son étoile pâlit; 10) avoir de l' étoffe.

=====
BIBLIA NOMARO

AARONO

Profeto de via frat', ho pastro Aarono,
Vi marŝe apudas lin kaj grandas pro la kredo
Gardante la obeon pro via Diobŝedo
Kaj vi vortas al ĉiuj, eĉ al la faraono.

Vi preĝdekstras la estron sen la fanfarono
Por la unua batal': l' amalekida predo.
Vi ankaŭ partoprenas en la sinaja heredo,
Kiam popol' atendas pri la leĝodispono.

Kial vi peke stumvlis pro la perfidbovido
Farota per via man' el la ora trofeo,
Ho benita sacerdot', permanenta gentgvido?

Kaj kial malhumile en pleja apogeo
Kun frat' vi rebelis per incensilinsido,
Sen pripense, sen ame, alfronte al Moseo?

30/1/78.

ABIGAIL

Abigail, vi estas tutvere patra ĝojo
Vid-al-vide al via malsaĝa edzo Nabal,
Kiu ĉiam memzorganta, sena je ajn ideal'
Neniam frate paŝas sur amikeca vojo.

./...

Via rideto estas sunrebrilanta roĵo,
Kiam vi azeniras al la paciga batal'
Kun kukoj, ŝafoj, vino kaj la interliga sal',
Ĉirkaŭita gajkante de la hundara boĵo.

Vi surprenis la krimon kun streĉa penta forto
Kaj milde alparolis la koleran Davidon
Venantan kun la celo de la perglava morto.

Virina elokvento ŝiras la virsolidon!
Kaj nune vi paradas en regnestra eskorto
Por heredi plej tuĵe la palacan eksidon.

31/1/78.

ABIMELEA

Mortigo, pereigo, malbono kaj kruelo,
Ega mallaboremo: ĉu regnestraj kvalitoj
En elektita lando? Jen do la ekkrepitoj
De la inta disigo en la nova Babelo.

Kie la olivarbo kun sia grasa felo?
Kie la dolĉa figarbo fruktema sen hezito?
Kie l' plenmosta vito por la homa profito?
Fieras la dornarbo pro nura pika celo.

Nun reĝas Abimeleĥ, kies manoj bolsangas
Ĝiskerne kontraŭfrataj kaŭze de regnavido.
Ĉie reĝo embuskas, ĉie fajro lavangas.

Ĉu ĉiam vivados via krimomorbido?
Atentu! Venka glavo kelkfoje bumerangas.
Celade vin, murdisto, alrajdas la perfido!

1/2/78.

ABISAG

Kadukiĝis Davido post lerta travivado
Kaj malgraŭ riĉaj vestoj ne plu kapablis vere
Varmiĝi en sia litō. Do kiamaniere
Lin atingos la ardo? Post serĉa kavalkado

Troviĝis junulino, kies korpa aŭbado
Plej ĉaste akompanos la reĝon efemere
Ĝis li mortos, kunece, sentime, sensufere
Kaj certe kun respekto de la sceptra parado.

Abisag, vi ne kronis vian strangan laboron,
Ĉar poste Adonija dezirante edzinon
Kun kaŝa regnavido petas vian deĵoron.

Sed verda Salomono timante la obstinon
Decidas patrinspite lian ĉemortan horon.
Ĉu nur vi plaĉbelulin' prizorgas mortrafinon?

2/2/78.

ABNER (Patro estas lumo)

Ĉu vere via patro estis por vi la lumo?
Ĉiutage vi manĝis ĉe la saula tablo
Kaj alflankis la reĝon pro konsila afablo
Atente aŭskultante por helpi post cerbumo.

Plej ruza de la kapo ĝis la ŝua plandumo
Post pereo de l' amik' kaj mortig' sen agrablo
De Asahel', post fal' de Iŝ-Boŝet, ĝis kapablo
Vi traktis kun Davido por la pacoplenumo.

Ĉu do vi malbenos la fraton de la junul'?
Ĉu vi iam forgesis pri la venĝema amo?
La venkantapartio aspektas sangiga lul'!

Ĝen kial samvespere anstataŭ dankaklamoj
Laŭ la mosea leĝo de okulo pro okul!
Joab kaŝaltiras vin al la perfida dramo.

3/2/78. (daŭrigota)

XX

ATENTON!!

1. Por ĉiu adresŝanĝo, bonvolu sendi la banderolon + 3 F per poŝtmarkoj al la kasistino. Antaŭan dankon.
2. La materialon por la bulteno oni sendu nepre antaŭ la 10-a de ~~januaro~~, decembro, marto, junio kaj septembro.

XX

AKVO POR NIA MUELEJO.

"Mais il est évident que, là encore, les barrières linguistiques ont été extrêmement gênantes lorsque les sympathiques guides de l'Intourist n' étaient pas là."

(eltiraĵo el la artikolo "Retour de l' Est", de J. Godard, aperinta en la revuo "Alcool ou santé" n° 144 jan-feb. 78. Tiun revuon eldonas "Comité National contre l' alcoolisme" 20, rue St-Fiacre 75002-PARIS)

XX

KOTIZTABELO 1978

IKUE kun "Espero Katolika" 44 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

* * * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 12 F
 infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 6 F
 Membro bonfaranto 60 F
 Dumviva membro 240 F

 UFE kun "Revue Française" 80 F
 UEA kun "Esperanto kaj Jarlibro" 110 F
 Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

 Abono al "Biblia Revuo" 35 F
 Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4 704 43.

XX

Dépôt légal: 3ème trimestre 1978 !!! Polycopié par F. M. C.
 Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
 Directeur-gérant: Gaston VERON !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE